

## VILĈJO ROWE 1924-2012

William 'Vilĉjo' Rowe, dum multaj jaroj membro de la Londona Esperanto-Klubo kaj Londona UEA-delegito, forpasis la 4-an de Aprilo, aĝa 87 jarojn.

Vilĉjo naskiĝis en Whitehaven, Kumbrio, en 1924, kaj transloĝiĝis al Londono en 1937. Li eklernis Esperanton en 1941, je la aĝo de 16 jaroj. La juna Vilĉjo amis ankaŭ la francan lingvon, kaj gajnis stipendion por studi en la Londona Franca Liceo en South Kensington. Pacisto, li rifuzis militservon, kaj servis en hospitaloj Guy's kaj UCH anstataŭ aliĝi al la armeo. Je la aĝo de 21 jaroj, okaze de kunveno de la Londona Esperanto-Klubo, li renkontis Evelyn 'Evenjon' Dennis. Vilĉjo kaj Evenjo gefianĉiĝis en Berno, Svislando, dum la unua postmilita Universala Kongreso en 1947, kaj geedziĝis en 1948.

Vilĉjo kaj Evenjo havis du filojn, Filipo kaj Karlo, kaj edukis ilin ambaŭ kiel denaskajn Esperantistojn. Kiel junulo Vilĉjo instruis Esperanton en Morley College, kaj poste li laboris kiel instruisto en kolegioj en West Ham kaj Thurrock. Li interrompis la karieron por studi la ĉinan lingvon en la Lernejo pri Orientaj kaj Afrikaj Studoj (SOAS) de la Universitato de Londono. En 1972 li akceptis postenon en la Politekniko (nun Universitato) de Huddersfield, kie li instruis la ĉinajn lingvon kaj literaturon.

Post la emeritiĝo en 1987 li daŭris instrui (li preferis diri, 'kune studi') diversajn lingvojn, inkluzive de Esperanto, sub la aŭspicioj de la 'Universitato de la Tria Aĝo'. Post la morto de Evenjo en 1999, Vilĉjo transloĝiĝis al Hitchin, Hertfordshire, por esti proksima al la filoj kaj genepoj. [Karlo Rowe]



## BELALUMO RAWLINSON 1960-2012

Belalumo (Kŭan Mi Li) naskiĝis en Ĉunĉon, en orienta parto de Suda Koreio, en 1960. La familio translokiĝis al Seulo dum ŝia junaĝo. Ŝi lernis Esperanton en 1992, kaj volontuliĝis dum la UK en Seulo en 1994, kie ŝi renkontis la plej gravan amikinon, Salo Li. La du fariĝis kiel fratinoj. Estante aktiva Esperantisto, ŝi prenis la nomon "Belalumo" - la vera nomo Kŭan Mi signifas "bela lumo" en la ĉina.

En 1996 Belalumo translokiĝis al Eŭropo - en komenco al Francio, kaj poste al Londono. Tie ŝi estis allogata al la Londona Esperanto-Klubo, kie la estonta edzo, Antony Rawlinson, jam estis aktivulo. La du geedziĝis en oktobro 1998.

Sekve venis du infanoj: Bianca, naskita en 2000, kaj Dominic, naskita en 2002. Belalumo konstruis la vivon en Anglio, kaj fariĝis Brita civitano en 2004. En Londono Belalumo studis kuirarton, kaj komencis starigi reputacion por lerte ornamitaj kukoj inter siaj konatuloj. Ŝia ambicio celis krei komercan entreprenon, provizi artaĵojn en formo de kukoj por personaj festoj.

Kun la infanoj fine de 2010 Belalumo faris lastan viziton al la hejmlando, sed baldaŭ post la reveno diagnoziĝis je kancero. La lukto kontraŭ la malsano daŭris unu pluan jaron, sed tragike malsukcese por homo kiu ŝajne ne plenumis sian eblon. [Antony Rawlinson]



## GRETE GERTNER 1914-2012

Mrs Gertner was a staunch supporter of Esperanto, which she had mastered before I met her.

Born in Austria into a very comfortable family – her father and uncle had a very flourishing business. Her father served in the Austrian Army in World War 1 and was proud to do so. Needless to say, all was lost when Hitler came to power.

Grete loved England since she was sent here after she finished High School and before University – to complete her education as a young lady. The family fled Austria and settled in the U.K. before World War 2 began. Grete became a social worker, and then trained social workers until she retired. She took up Esperanto with the late John Spencer and became active in the London Esperanto Club and S.A.T.E.B.

When I eventually joined the London Club because of the late Joan Dawson, I became acquainted with Grete. She was a great reader, well travelled, interested in Art and visited museums regularly. She loved the theatre and spent much of her retirement following these interests. She had regular S.A.T.E.B. group meetings in her home: held responsible jobs in S.A.T.E.B., being a committee member – as well as doing the same in the London Club.

I was very privileged to have met Grete and been her companion on several S.A.T.E.B. and S.A.T. congresses here and overseas. She was always very lively and able to participate in any kind of discussion. The Esperanto Movement has lost a very great supporter. [Pearl Simons]

---

### Prof. John Wells: Malfeliĉa Novaĵo

Vicprezidanto John Wells skribis malfrue en junio*: "Mi suferis apopleksion kaj kuŝas nun en la hospital St. Helier. Mi ne povos esti en la klubo certe plurajn semajnojn."*

Pro tio, Magnus Henoch - kaj eventuale Marteno Miniĥ - gvidos la Lingvajn Seminariojn, kiuj okazos en julio kaj aŭgusto.

---

***Esperanta Kalendaro:***

28 julio - 4 aŭgusto: 97-a Universala Kongreso de Esperanto en Hanojo, Vjetnamio
http://uea.org/kongresoj/uk_2012.html

***Aliaj anoncoj:***


*Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la Program-sekretario.*

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ la 21a de aŭgusto por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere ĉe Londona Irlanda Centro. Antaŭ la ĉefprogramero kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaftrinki kaj babili.

Kutima programo:
18:00 – 19:15 *beginners' class*
19:15 – 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero
20:15 – 20:45 paŭzo
20:45 – 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero
22:00 fino




Loko: London Irish Centre,
50-52 Camden Square, NW1 9XB
(tel: 020-7916 7272)
Metrostacio: Camden Town
Fervojo *London Overground*: Camden Road
Busoj: 29, 253, 274, 31.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.
Kluba retejo:
http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895; Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346 rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo 020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk. Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close, Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.

**Kluba Programo:**

**julio**

6 Socia Vespero

13 Magnus Henoch: Lingva Seminario
(1800h: Konsilantaro)

20 Joyce Bunting: *Tritiko - Rikolt-Eksperimento*

27 David Thornell: *Antikvaj Olimpikoj*

**aŭgusto**

3 Socia Vespero

10 Legu Pervoĉe Preferitajn Tekstojn

17 Promeno tra Regent's Park*

24 Ludvespero
(1800h: Konsilantaro)

31 Magnus Henoch: Lingva Seminario

**septembro**

7 Terry Page: *Naivorele*

***Bv. atenti la kunsenditan instrukcion pri kiel atingi Regent's Park (17an de aŭgusto).**

---



## Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

La nuna numero de la Bulteno inkluzivas multe da malfeliĉegaj novaĵoj. Tio estas memevidentaĵo. Mi do aldonu feliĉigan novaĵon: **HUSEJN AL-AMILY** ĵus ricevis novan eldonon de sia verko, *Taglibro de Malliberulo* (Milano: Esperanto Por Monda Interparolado, 2012), kun redaktaj kontribuoj de Renato Corsetti kaj Bardhyl Selimi. Tiu interesega libro jam aperis en la albana, la itala, la araba, la angla kaj Esperanto – kaj baldaŭ aperos ankaŭ en la germana. Gratulojn do al nia Honora Vicprezidanto, Husejn!

*Notu bone pri la planita Promeno tra Regent's Park, per kaj la Programo supre kaj la informoj kunsenditaj!*

Sincere Via,
David Thornell

---

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honoraj Vicprezidantoj: Valerie Atkinson, Husejn Al-Amily.

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Michael Sims, Antony Rawlinson (Program-sekretario kaj Bultenisto).
Adresoj: David Thornell: Flat 7, 80 Gloucester Ave, NW1 8JD, 020-8752 8147 chainaldus@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ 01277-228962 arturo@signalprent.demon.co.uk, Terry kaj Anica Page:7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP 01908-564004; terry_page@btinternet.com, anica_page@btinternet.com, Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY 020-8531 1533 acj.rawlinson@ntlworld.com.